'Se vi havas amikon inter la esperantistoj de Britio, petu tiun pri ŝtelado de ekzemplero por sendi al vi. Ĝi meritas. Temas pri (unu el) la plej belaj informmaterialoj de la lastaj tempoj. Krome, kaj ĉefe, niaj britaj kolegoj ne timas alparoli neesperantistojn pri Esperanto. Ion tian ni bezonas ankaŭ en aliaj landoj.'

• 'Ĉu vi jam sendis ekzempleron al Aŭstralio? Se ne, ĉu eblas sendi ekzempleron al mi? Mi volonte sendos al vi la koston. ILEI-anoj povos rigardi kaj admiri ĉion dum la somerkursaro januare en Novsudkimrujo. Poste ni nepre strebu al kunlaborado.'

• 'Akceptu niajn plej korajn gratulojn en la nomo de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo! La hejmpaĝo kaj ĝia enhavo tre plaĉas al mi.'

**NB.** *If you wish to contact a school, schools or any educational establishment, please speak to Angela Teller, our Education Co-ordinator first (tel. 01394 271683), or via another member of the education team. This way we can assure everyone is working together and all action is made most effective.*

*Helen Fantom  
conversing  
with  
interested  
young  
people at  
the London  
Language  
Show*



All photos by  
Gavan Fantom



## *Impressions of EAB at the London Language Show*



- ‘Angela’s newly modified worksheets were extremely well received. Thanks to Hannah Tellier, Gavan Fantom and Rosemary Stanley for their support (and they weren’t there just because their mums were), and to Tim Morley for his sterling contribution on Saturday and to Arthur Sly for helping the set up – a second pair of hands is essential then.’

Helen Fantom

- ‘I went to the Language show today as an observer, and felt quite proud to be connected with the Esperanto exhibit. The stand was attractive in appearance and content, focused on the Springboard Project, was well manned and womanned, surrounded by interested enquirers all the time.

‘The presentation of the Springboard Project went well and had a good attendance, around 70 people. (This was more than the French and Spanish sessions.) David Kelso clarified ‘language awareness’, Helen Fantom and Elizabeth Stanley answered questions very capably, and a good number of people stayed behind to find out more. (I learnt a lot, too.)

‘The professional appearance and content of Esperanto materials is equal to the standards of commercial exhibitors. Enquirers

were impressed by the logic and clarity of the teachers’ packs.

‘Congratulations to the education and publicity teams who put in an enormous amount of work to make this a successful event, which undoubtedly impressed many teachers. They deserve pats on backs and a long rest!’

- ‘Ni uzis la prezenton en la komputa programo Powerpoint de Ian Fantom kaj lian liston de retadresoj, kio estis populara. Ian planis multon de la budo, kaj akceptis la pakaĵojn, kiujn Viv O’Dunne sendis el la oficejo de EAB.

‘Ankaŭ Tom Shorney, studento pasintjare de Elizabeth Stanley, donis dudek minutojn da helpo por ke mi lunĉu je dimanĉo. Aliaj finpreparis por la prezento.’

- ‘Ses aŭ sep deĵorantoj trois por la spaco, sed garantiis, ke ni vidis partojn de la ekspozicio, parolis kun aliaj budestroj pri kunlaboro kaj diskutis estontan agadon por Springboard.’

- ‘I found the experience very encouraging and worthwhile. I’m just back from Bulgaria where the Esperanto Comenius

*David Kelso in full flow at the presentation and (left) Hannah Tellier charming a passer-by*

project AKEL, linking three schools from England, Italy and Bulgaria, got off to a flying start – we all had a brilliant time. The president of the Bulgarian Esperanto Association came over from Sofia to meet us (three hours drive).’

- ‘This year the siting of the stall could not have been better. We had an excellent position, to one edge of the hall, on the end of a row along a main thoroughfare, not too far from the café, but far enough so as not to be bothered by it, allowing a constant stream of people to pass.

“Advertising’ was streamlined and directed, meaning that ‘distraction’ was kept to a minimum and attention focused on a particular aim – this year the Springboard Project. Large, attractive posters of springing owls immediately caught the eye; a shelf of books, enough, but not too many, sustained interest. A Powerpoint presentation caught the attention of others. I would have preferred the presentation to have been on the computer screen rather than on the wall,

because it focuses attention better, and workers often inadvertently got in the way of the projected image. The whole appearance was uncluttered and professional; we compared very, very favourably with other stalls.

‘Materials were aptly chosen and except for the odd omission we had everything we needed. A copy of *Pasporta Servo* and the *Jarlibro* would have been useful as a lot of ‘foreigners’ pass by and ask if there is anyone in their country who speaks Esperanto. To show a page with ‘proof’ would be useful.

‘Customers divided into categories and we need to cater for the needs of all, and I think this year we did extremely well. There are the non-teachers, just visiting because they like languages, mostly young people. Most are open-minded and receptive to the idea of Esperanto and quite willing to accept a lesson and ‘give it a go’. These gravitated towards the ‘young’ presenters, Gavan, Hannah, Tim. Having well-dressed ‘youth’ on show was a key attraction, and a great asset.

‘Then there are the teachers who divide into Primary, Secondary and adult education. The greater majority seemed to be in Secondary. One chap in particular was keen to ‘adopt’ the programme for low-achievers in years 7–9. Primary school teachers almost all thought the programme a good idea. Most are only teaching languages for two of the required four years (years 5–6) and could see that it would be a beneficial programme to introduce to fill the other two years (3–4).

‘We collected over 50 names of teachers and language coordinators who expressed more than passing interest and wish to receive an information pack. Viv O’Dunne will send these out with a covering letter. Almost everyone reacted positively. Children received stickers and a ‘fish’ postcard, were invited to write their name and address and will receive a ‘children’s pack’ through the post.

‘There were, of course, the obnoxious few who I’m sure were like that to everyone and took particular delight in arguing. There were those who wished to narrate their entire life-story and were difficult to get rid of!

‘What to do about those who get very enthusiastic, who live in London, want to go to the London Club and receive lessons? One lady became so enthused she visited the London Club on Friday evening, came back with a friend to hear our presentation on the Sunday and intends going with her next week! Both are teachers. Great – but is there adequate provision at the London Club to ‘retain’ beginners? If we exhibit again we should perhaps make sure a beginners’ course is scheduled to start shortly afterwards, because they were not the only ones who asked.

‘We did not have a favourable time slot for the presentation. The last one on the last day, but we attracted about 80 people, which was more than some presentations (only 15 information packs were left out of a 100). People stayed put, listened through and asked appropriate questions, answered by Helen and Elizabeth. It all went extremely well; David was well prepared, turned on the charm and the jokes, and the reactions afterwards were positive. One lady confided that our talk was much better and more interesting than the one she’d been to

### *The Esperantic Studies Foundation*

welcomes funding proposals for research that furthers understanding of interlingualism or tests its applicability to particular settings, for instance in an educational institution, international organisation or on-line community. Submission guidelines may be found under the Interlingual Research Grants programme: [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)

previously on IT in the classroom; praise indeed!

‘I’m sure I speak for all who attended for the three days, and even for those who attended for two, when I say we were absolutely shattered! It was very stretching, a little nerve-wracking and sapped a good deal of energy. Helen, who set it all up and took it all down, must be even more worn out than the rest of us. David flew in from Italy specially. But – it went brilliantly, with great good humour on all sides and a good spirit of co-operation. We found a bit of time to sit down together and discuss and plan the next Springboard step – and the stall was never left alone for a minute. A couple of stalls are keen to publish books in Esperanto; good leads to follow.

‘There is no doubt that this year was a very worthwhile experience.’ □

*A wider view of EAB’s stand on a busy aisle at the London Language Show*



Photo by Gavan Fannon

# Gravega franca raporto prisilentata de la amaskomunikiloj

*Jen kelkaj eltiraĵoj el Raporto Grin, kiu estas la rezulto el studo mendita de la franca Haut Conseil de l'Évaluation de l'École (Alta Konsilio por Taksado de la Instruado). La raporto, redaktita de profesoro François Grin, ekzamenas tri planojn: «Ĉio-nur-angle» (plano 1); «Plurlingvismo» (plano 2); «Esperanto» (plano 3). Prof. Grin cetere alparolos en la inaŭguro de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Florenco (vidu paĝon 20).*

**E**mfazitaj estas sur paĝoj 6–7 ne la konsekvencoj de la efektivigo de tiuj planoj, sed nur ilia komparo en la senco de efikeco kaj justeco. Konsiderante la novecon de la kadro de analizo kaj la foreston de sufiĉaj konoj, la taksado povas esti nur proksimuma kaj ĝi celas havigi nur gradon de grandeco; tio estas tamen, laŭ mia kono, la unua fojo kiam oni provas kalkuli la netajn transdonadojn, pri kiuj profitas la anglalingvaj landoj pro la superrangeo de la angla, kaj la ŝparaĵojn, kiuj estus efektivitaj en kazo de transiro al alia plano. Memkompreneble, ne estas la angla lingvo kiu kulpas kiel tia, sed la lingva hegemonio, kiu ajn estas la lando aŭ landogrupo, kiu profitas el tio.

## Ĉefaj rezultoj el la komparo inter la planoj estas:

i) Unuiĝinta Reĝolando nete gajnas minimume 10 miliardojn da eŭroj ĉiujare pro la nuna superregado de la angla;

ii) se oni prikonsideras la multiplikan efikon de certaj komponantoj de tiu sumo, kaj ankaŭ la rendimenton de la kapitaloj, kiujn la anglalingvaj landoj povas investi aliloke pro la privilegiita pozicio de sia lingvo, tiu totalo sumas je 17 ĝis 18 miliardoj da eŭroj jare;

iii) tiu sumo estus certe pli alta, se la hegemonio de tiu lingvo plifortigis pro prioritato, kiujn koncesius al ĝi aliaj ŝtatoj, precipe en la kadro de siaj respektivaj edukpolitikoj;

iv) tiu sumo ne enkalkulas la

apartajn simbolajn efikojn (kiel la avantaĝo pri kiuj ĝuas la denaskaj parolantoj de la hegemonia lingvo en ĉiu situacio de intertraktado aŭ de konflikto okazanta en ilia lingvo); tamen tiuj simbolaj efikoj havas sendube ankaŭ konsekvencojn materiajn kaj financajn;

v) la plano «plurlingva» (kiu povas, praktike, havi tre diferencajn formojn, inter kiuj unu estas ĉi tie analizita) ne reduktas la kostojn, sed la malegalecojn inter parolantoj; tamen, pro la fortoj manifestiĝantaj en la kunpuŝigo de la lingvoj, ĝi prezentas riskon certan de malstabileco kaj postulas tutan aron da antaŭrimedoj por esti vivpova;

vi) la plano «Esperanto» aspektas kiel la plej avantaĝa, ĉar ĝia konsekvenco por Francio estus neta ekonomio proksima al 5,4 miliardoj da eŭroj jare kaj, nete por la tuta Eŭropo (inkluzive de Unuiĝinta Reĝolando kaj Irlando) de ĉirkaŭ 25 miliardoj da eŭroj jare.

La oftaj reagoj de rifuzo rilate al Esperanto malebligas la realigon de tiu plano 3 en mal-longa tempo. Ĝi povas, tamen, esti rekomendita en la kadro de longdaŭra strategio efektivegebla en unu generacio. Du kondiĉoj estas tamen decidigaj por ĝia sukceso: unue, tre grava informstrebado, cele superi la antaŭjuĝojn, kiuj ĉirkaŭas tiun lingvon – kaj kiuj ĝenerale baziĝas sur la nura nescio – kaj helpi al mens-evoluado; due, vera interŝtata kunordigado cele al komuna starigo de tia plano. Okdek kvin

**‘Plano  
«Esperanto»  
aspektas kiel  
la plej  
avantaĝa, ...  
estus nete  
por la tuta  
Eŭropo ĉ.  
25 miliardoj  
da eŭroj  
jare’**

procentoj de la loĝantaro de la 25-ŝtata Eŭropo havas en tio evidentan rektan intereson, sendepende de la politikaj kaj kulturaj riskoj, kiujn enhavas la lingva hegemonio.

(pp.65–6): La lingva hegemonio favore al la angla estus tre malbona afero por Francio kaj ankaŭ por ĉiuj ŝtatoj neanglalingvaj de Eŭropa Unio, eĉ preter la landlimoj de la Unio, ĉar ĉi tiu formulo estigas plejeble mal-justan redistribuadon tra la kvin vojoj, kiuj estas la sekvaj:

i) pozicio de kvazaŭmonopolo sur la merkatoj de la tradukado kaj interpretado al la angla, de la redaktado de tekstoj en la angla, de la produktado de pedagogia materialo por la instruado de la angla kaj de la instruado de tiu lingvo;

ii) la ŝparo de tempo kaj de mono en la internacia komunikado, ĉar ĉiuj parolantoj nedenskaj faras la strebado esprimiĝi en la angla kaj konsentas akcepti mesaĝojn dissenditajn en tiu lingvo;

iii) la ŝparo de tempo kaj mono por la anglalingvanoj pro la fakto, ke ili ne plu strebas por lerni aliajn lingvojn;

iv) la rendimento de la investo,

en aliaj formoj de homa kapitalo, de la monrimedoj, kiujn la anglalingvanoj ne plu bezonas investi en la lernado de la fremdaj lingvoj;

v) la superregata pozicio de la anglalingvanoj en ĉiu situacio de intertraktado, de konkurenco aŭ de konflikto disvolviĝanta en la angla.

La ekzisto mem de tiuj distribuaj efikoj estas malmulte konata; necesas diri, ke la esploroj, kiuj atentigas pri ili (certaj estas fakte jam menciitaj en la franca jam de longa tempo, vd. ekzemple Carr, 1985) restis relative konfidencaj. Ĝis nun, ili ne estis objekto de detala taksado (Grin, 2004a); sed la antaŭtaksadoj faritaj en ĉapitro 6 indikas, ke tiuj sumoj kalkuliĝas en miliardoj da eŭroj jare. Sur ĉiu alia tereno de la politiko, tiaj transdonadoj estus tuj publike malaprobataj kiel neakcepteblaj.

(p.70): Pro tio necesas re-memorigi pri la ekzisto de tria strategio, t.e. la investado je longdaŭra tempolimo, kaj nepre kunordigita inter ŝtatoj de la Unio, en la instruadon de Esperanto. Tiu ĉi raporto ne celas absolute defendi tiun opcion, ĉar ni scias, ke ĝi ofte estigas pasiajn reagojn aŭ ke ĝi estas tuj forpuŝita sen ia ajn argumento, aŭ surbaze de argumentoj fontantaj el miriga nescio (Piron, 1994, 2002).

(...) La sinturno al Esperanto estas do en la evidenta intereso de pli ol 85% de la eŭropaj civitanoj, precipe post la plilarĝigo okazinta en 2004.

#### En kazo de elekto de Esperanto (p.102):

En la tempospaco de unu generacio, maljustaj transdonoj de miliardoj da eŭroj estas elimineblaj, kaj je skalo de Eŭropa Unio, neta ŝparo de pli-malpli 25 miliardoj da eŭroj jare estas ebla. Komparcele, la tuto de la buĝetigitaj elspezoj por 2005 fare de Eŭropa Unio sumas je 116,55 miliardoj da eŭroj. Oni malbone vidas pro kia logikeco 23 el la 25 ŝtatoj-membroj devus

daŭre favori du aliajn per donaco, kiu kostas al ili, nur je la nivelo de la eduksistemo, la 'bagatelon' de 26,7 miliardoj da eŭroj ĉiujare, des pli ke tiu masiva strebo lasas la plimulton de la eŭropaj civitanoj en situacio de malsupereco. Antaŭ intereso tiel evidente konverĝa, kaj kiu estas perfekte kongrua kun la postuloj de la socia justeco, la saĝo devus do konduki la ŝtatojn interkonsenti por progresiva kaj kunordigita starigo de la plano 3. Memkompreneble tiu kunordigado inter ŝtatoj ne devas prikonsideri nur la eduk-politikon; ĝi devas ankaŭ zorgi pri la disvastigo de informado kaj evoluigo de la mensostatoj.

#### Konkludo (p.106):

Entute ŝanĝiĝas la problemoj tuj kiam la kadro estas tiel pli-vastigita: kvankam ne facila, ĝi fariĝas solvebla – por la plej granda profito de la imposto-paganto, de la socia justeco, kaj de la diverseco de la lingvoj kaj de la kulturoj.

**François Grin** estas Profesoro pri Ekonomiko ĉe la Lernejo de Tradukado kaj Interpretado (ETI) de Universitato de Ĝenevo, Vicedirektoro de la Ĝeneva Departemento de la Publika Instruado, konsultanto pri lingva politiko kaj pri politiko de edukado por la oficialaj organismoj svisaj, kaj eksterlandaj de organizaĵoj internaciaj kaj neregistaraj.

## 'Sinturno al Esperanto estas en la evidenta intereso de pli ol 85% de la eŭropaj civitanoj'

Teksto de Henri Masson,  
Gazetara Servo de  
SAT-Amikaro.

• La kompleta 127-paĝa pdf-dokumento estas elŝutebla ĉe:  
[http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport\\_Grin.pdf](http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf)  
kaj anglalingva prezento ĉe la sama ttt-adreso + /hcee/publications-2005.html#link1.

## 25-jariĝo de la Afrika Agado de UEA

En la Stokholma Universala Kongreso de 1980, Renato Corsetti, tiama estrarano de UEA pri la regiona agado prelegis, kaj tiam invitis homojn al kunlaboro por 'verdigi' aliajn kontinentojn. Ĝis tiam la movado en Afriko estis preskaŭ nekonata. Hans Bakker grandparte transprenis tiun agadon.

Jam dudek kvin jaroj pasis. Bilanceto montras multon.

**Jam kvar afrikaj kongresoj**  
Esperanto atingis multajn

angulojn de la kontinento. Okazis kvar afrikaj kongresoj kaj multaj naciaj. Afrikanoj ne nur lernis de li Esperanton, sed ankaŭ ricevis kaj pluricevadas de li la sukcon de sia vivo: lernantoj finstudis, metilernantoj fariĝis mastroj, senlaboruloj ricevis laborilojn, malsanuloj resaniĝis; infanoj edukiĝas, multaj afrikanoj havas pli realan komprenon pri la vivo ktp.

La tuta Afriko adresas sian dankon al Hans Bakker kaj gratulas lin pro tiu ĉi datreveno.

Ili ankaŭ ne forgesas dekojn da aliaj aktivuloj, kiuj partoprenis en la agado. Afrika Agado tute ne estas laboro de unu sola persono sed de multaj aktivuloj, helpemuloj, sendantoj de libroj, instruantoj, korespondantoj, donacantoj al Afrika Fondaĵo kaj Afrika Kapitalo.

La 15-a de septembro estis la unua tago de la nova lerneja jaro 2005–06 en Instituto Zamenhof en Togolando. Tiam ne abundis gelernantoj, ĉar ĉiuj atendas la oficialan daton por eniri la lernejon. Ĉiuj instruistoj estis tie, kaj la okazo memorigis al ili la eventon de la 15-a de septembro en la historio de Esperanto en Afriko. La instruistoj estis invititaj al kunmanĝo. La sekva tago ne silentis.

Ĉirkaŭ la naŭa horo vizitetis la lernejon instruistoj. Dum tiuj laboris, aliaj pretigis klasĉambron. Je kvarono post la 12-a

## ‘Jam kvar afrikaj kongresoj’

horo ĉiuj estis en la klaŝambro kaj okazis prelegeto pri la signifo de 15-a tago de septembro en la vivo de Esperanto en Afriko. Ĉiuj komprenis, ke sen tiu tago hodiaŭ ne estus Instituto Zamenhof en Togolando, kiu vivtenigas ilin. Kapoj moviĝis kontentaj.

Dudek kvin jaroj en la ekzistado de io tute ne estas bagatela. Kion Hans Bakker kaj aliaj kunlaborantaj organizaĵoj povis fari por la afrika movado dum tiuj jaroj, tio estas tiom granda, ke la afrikaj esperantistoj esprimas siajn dankojn al ili. La esperantistoj de Afriko taskas al si sekvi la paŝojn de sia ĉefa vartanto Hans Bakker.

### Kaj nun?

En la komenco – la jaroj 1980 ĝis ’90 – donacoj de multaj membroj de UEA nutris la Afrikan Fondaĵon. Ne nur membroj de

UEA. Aliaj asocioj abunde helpis.

Ni memoru nur SAT kaj SAT-Amikaron. Aŭ Hungaran Esperanto-Asocion, kiu en 1987 organizis kvin-semajnan seminarion por 13 afrikanoj, aŭ Oomoto, kies Premio Deguĉi financis grandparte la vojaĝon de tiuj afrikanoj. Post tiu komenca periodo afrika agado perdis sian novecon, sian sensacion. Donacoj malpliĝis. Ekzemple, en 2004 alfluis al Fondaĵo Afriko 65 donacoj, je sumo de 5 634 eŭroj, el kiuj 34 venis el Nederlando, 11 el Svedujo (10 de unu persono),



Lernejo en Burundio

3 el Japanujo. Multaj donacoj estas de 25 ĝis 50 eŭroj.

Malmultaj estas tre grandaj: 2 000 de Hans Bakker, 475 kaj 450 eŭroj de alia nederlanda esperantistino, 200 eŭroj de

## Esperanto oficiale aprobita en Burundio

En aprilo 2003, sub iniciato de Monda Paco-Asocio (MPA), ni komencis disvastigi Esperanton en Burundio. Ni renkontis reziston kaj eĉ kontraŭstarojn. En decembro 2003 ni petis helpo de la Afrika Oficejo, ke ili disponigu al ni dokumentojn pri la lingvo kaj ties movado. Pere de Hans Bakker la Afrika Oficejo sendis la statutojn de UEA kaj la diversajn rezoluciojn de Unesko pri Esperanto, kiuj povis konvinki la burundiajn aŭtoritatojn.

Ni decidis fondi la Esperantan branĉon de MPA kun la nomo UPS (Universala Paco-Asocio). La 20-an de marto 2004, la statutoj de UPS estis aŭtentikigitaj de notario en Bujumburo. Poste UPS estis akceptita de la Ministerio pri Kulturo, kiu la 30-an de aŭgusto 2004 faris seriozan esploron pri la influo de Esperanto sur la kulturo de nia lando Burundio.

La 3-an de novembro 2004 la Ministro pri Kulturo kaj pri Aferoj Sportaj kaj Junularaj akceptis nian asocion kaj permesis al ĝi enkonduki Esperanton en la burundian socion. Kun tiu ĉi agnosko UPS havas taskojn farendajn:

- starigi kunlaboran rilaton kun Unesko-centro en Burundio
- labori por la disvastigo de universala paco
- klopodi adoptigi la universalan lingvon en la burundia socio.

La paŝoj por la realigoj de tiuj punktoj jam komenciĝis. La 15-an de novembro ni enkondukis nian peton al la Unesko-centro. Tiun peton havas la paraŝon de la Ministro pri Kulturo.

### Jam varbis universitatnivelaĵn kursanojn

Ni jam varbis almenaŭ 126 novajn gelernantojn, kiuj havas universitan nivelon. Ĉiuj lernantoj jam faris la triajn lecionojn de kurso. Estas multaj interesiĝantoj ĉi tie en la ĉefurbo Bujumburo.

La plenumado de tiu ĉi laboro necesigas rimedojn. Lernolibroj diversaj, vortaroj, dokumentoj en Esperanto pri paco, manifestoj pri la Esperanto-movado, kaj ĉiaj aliaj esperantaĵoj estas necesaj por la sukceso de nia laboro.

MUDENDE Libère, Ĝenerala Sekretario  
NIMUBONA Frederiko, Prezidento de Universala Paco-Asocio bsp  
BP 1760 Bujumbura. Tel. (257) 21 76 57; rete: fednimu@yahoo.fr

finno. Pluraj aliaj donacis 100 eŭrojn. Hans Bakker kun bedaŭro vidis tiun ŝrumpadon de enspezoj kaj pripensis kiel krei 'eternan' bazon de enspezoj.

En 2000, kune kun la tiama estrarano de UEA pri la Agado en Afriko, li starigis la Afrikan Kapitalon. Tiu ĉi troviĝas ĉe UEA, kaj la rentoj estas uzataj por financi la movadon en Afriko. Bedaŭrinde la kapitalo ne estas tiom granda por ke ĝia rento estu sufiĉa por finance subteni la afrikan movadon.

Alia klopodo de Hans estis la starigo de la Fondaĵo Hans. Tiu ĉi 'Hans' estas ne Hans Bakker, sed Hans ten Hagen. Tamen, sciindas, ke la Fondaĵo estas starigita el monkontribuo de la familioj Bakker kaj ten Hagen. Tiu Fondaĵo financas trejnkursojn por Esperanto-instruistoj en Afriko.

### Speza streĉado

Malgraŭ ĉio, ne sufiĉus la mono por kovri la bezonojn de la kontinento. Tial la Estraro de UEA en la lastaj jaroj komprenis, ke ĝi devas aldoni iom el siaj propraj asociaj rimedoj (kiuj venas el la kotizoj de la membroj). Ĝi decidis subvencii la Afrikan Oficejon, por ke tiu ne elĉerpu ĉiom, kiom estas en la Afrika Fondaĵo. La Estraro de UEA decidis doni 3 500 eŭrojn por la salajroj de la AO-oficistoj, kaj 1 500 eŭrojn por la aliaj elspezoj de AO. Tiun decidon ĝi devas fari ĉiujare denove.

Esperantistoj en malriĉaj kaj nepagipovaj landoj arde deziras partopreni en la internacia vivo per membriĝo en UEA



Helpu ilin per mona kontribuo al Fondaĵo Canuto de UEA

Nun kion faru la afrikanoj mem? Necesas, ke ili sekvu la paŝojn de Hans Bakker. Li starigis la Afrikan Agadon kaj nun la afrikanoj mem devas prizorgi ĝin. Dank' al li nun funkcias fondaĵoj kaj kapitalo por Afriko. Ties esperantistoj devas prizorgi tiujn ĉi aferojn, kaj elpensi aliajn por ke la movado afrika ĉiam havu je sia dispono

monon por funkcii, sen kalkuli je organizaĵoj, kies helpo estas necerta. La Afrika Komisiono devas pripensi la aferon. Jam nun afrikanoj faru ion, kio certigu, ke la Afrika Agado vivos tiom longe kiom vivos Esperanto.

Gbeglo Koffi  
Afrika Oficejo de UEA,  
Togolando  
esp.togo@cafe.tg

## Letero el Kabulo

*Jen letero el Kabulo de juna taĝika kirurgo, kiu iris en Afganion por instrui Esperanton per subteno de aziaj esperantistoj kaj UEA.*

Skribas al vi sincera Esperantisto, via Saidnabi. Samkiel vi, mi havas koran senton disvastigi Esperanton. Laŭ miaj ebloj de lingvoposedo kaj bonŝance laŭ deziro de la Komisiono por la Azia Esperanto-movado kaj ĝiaj estraranoj, estimataj Hori Yasuo kaj Fukuda Tosihiko kaj certe kontribuinte kun UEA-Prezidanto, estimata Renato Corsetti, mi venis al Kabulo por instrui al afganaj KAAAdEM-anoj en la Kabula Universitato (KAAAdEM estas la nomo de la esperantista kaj Esperanto-simpatianta grupo en Kabulo).

Estas granda honoro por mi kaj mi ne laste dankas ĉiujn kontribuantojn, kaj mi devas rimarki, ke la sperto, kiun nun mi havas estas atingita dank' al UEA kaj TEJO, ĉar per ilia subvencio mi povis partopreni IJK-on en Rusio, kiu multon donis al mi, kaj mi povus daŭre kontribui kun supre skribitaj kaj al ĉiuj konataj Esperantaj organizaĵoj. Ekhavonte pli da sperto, mi povos multon fari por perslingva, azia Esperantujo, kaj mi kore petas interkompreni min ĝuste, alivorte bonvolu neniam pensi, ke mi fanfaronas pri mi.

### Enskribiĝis 150 lernantoj

Komence enskribiĝis pli ol 150 lernantoj sed pro tempomanko je

ilia flanko povis partopreni nur pli ol duono. Vere estis diskutite, ke mi instruos al KAAAdEM-anoj dum du monatoj sed, bedaŭrinde pro internaj kialoj de KAAAdEM, mi ne povis plu resti post unu monato sed tamen estis diskutitaj programoj, laŭ kiuj plej verŝajne ili denove invitos min aŭ iun alian instruonton denove al Kabulo.

Kvankam la nuna stato estas danĝera, sed sciinte, supozinte tion, kio min atendos en Afganio, mi atingis Kabulon. Interalie nur kelkajn fojojn mi vizitis la urbon (la universitato situas sude de Kabulo) kaj estas danĝere por fremduloj esti en la urbo solaj sen iu amiko, kaj ĉiuj povas imagi kiel aspektas tia lando/urbo kaj kia povas esti la kuraca stato, kaj samtempe miaj impresoj estas tute malĝojgaj, ĉar eble multaj scias, ke mi estas kuracisto/juna kirurgo kaj tiaj homoj estas sentemaj.

Do, loĝoĉambron kun nutromono prezentis d-rino Husnbanu Gazanfar, kiu estas dekano de la lingva kaj literatura fakultato de Universitato de Kabulo. Aliajn miajn elspezojn pagis KAEM.

Estis organizitaj kvar post-tagmezaj kursoj senpaŭzaj, kiuj unue estis distribuitaj inter la 1-a horo ptm ĝis la 5-a horo ptm, sed poste pro Ramadanio estis iome

ŝanĝigitaj la tempoj laŭ ordono de la Universitata Rektoro, sed la samaj grupoj daŭris. Ĉi tie oni ferias vendrede, kaj spite de tio mi ankaŭ en ĉi-tago instruis al kelkaj dezirantoj en la gastodomo, kie mi loĝis.

Ankaŭ ĉiujn matenojn mi okupiĝis pri instruado. Instruante al novaj dezirantoj, kiuj ne povis partopreni en la pasintaj lecionoj, mi distribuis ilin al la diversaj grupoj laŭ ilia nivelo kaj samtempe kore mi instruis la estimatan doktorinon de la universitato.

Ĝeneralan raporton mian, mi sendos al UEA kaj KAEM kaj ankaŭ al vi. Indajn lernantojn mi

rekomendos al UEA por ke ili estu aligitaj en UEA kaj en TEJO.

**Libro-bezono estas grandega**  
Do, ĉu estis fruktodona mia instruado? Tempo montros, ĉar gelernantoj bezonas tempon por utiligi la aldonitajn informojn. En la fino de la kurso mi skribis sur la tabulon multajn retadresojn, kaj mi petas ĉiujn, kiuj ricevos mesaĝojn el KAADEM-anoj, bonvolu korespondi kun ili. Libro-bezono kaj vortaro-bezono estas grandegaj.

*Estigu Esperanton en Afganio per via helpo!*

Esperanto ne bezonas homojn sed homoj bezonas Esperanton.

Ege simplanima,  
Saidnabi Saidilhomzoda  
Vicprezidanto de  
Taĝika Esperanto-Asocio  
Skribita en Kabulo, Afganio,  
je 12.10.2005

Ps. Kvankam iome mi adaptiĝis al la laŭta voĉo de la bomb-eksplodoj, kiuj aŭdeblas ĉiutage, tertremo tre timigis min, ĉar estis tre longa, kaj neniam mi estis tiel ŝokita kiel en tiu tago.

• Jen sekura adreso por donacado de libroj al afganaj esperantistoj: S-ro H.B. Ghazanfar, Faculty of Literature, Kabul University, Jamal Mina, Kabul, Afganio.

## Brito ĉe la 1-a Azia Esperanto-Kongreso

Tre interesis min la novaĵo sur paĝo 12 de la pasinta numero de *EAB-Ĝisdate*, pri Azia Esperanto-Kongreso okazanta en 2008, ĉar mi estis la nura brito ĉe la unua tia kongreso, okazinta en 1996. Mi ankoraŭ portas la pruvan T-ĉemizon ĵaŭde ĉe mia loka gimnastikejo. Dorse ĝi montras grandskale la vorton 'ESPERANTO'.

### Dediĉo al nia movado

Mia dediĉo al nia movado pelis min ĉeesti la kongreson, malgraŭ ke mi devis unue perlabori sufiĉe da mono, ĉar mia edzino kaj mi vivtenas nin nur per mia malalta pensio. Mi iĝis merkato-esploristo, aŭ demandante la publikon surstrate en Bristollo aŭ Bath pri diversaj varoj, aŭ vizitante homojn en iliaj domoj por registri



David Curtis parolas ĉe la 1-a Azia Esperanto-Kongreso

opiniojn pri servoj aŭ problemoj. Post du jaroj mi povis pagi miajn vetur- kaj loĝ-kostojn, sed la kongreso daŭros nur semajnon, kaj tial mi sendigis de Bristollo al la ĉina urbego Guilin tre multekostan libron pri la angla lingvo deziratan de Guilina korespondamiko, universita specialisto Liu Ŝaŭgong. Li promesis reciproke loĝigi kaj nutri min en universita dormejo dum tiu kroma semajno, dum kiu mi instruus liajn kolegojn en Esperanto-Asocio de Guilin. Do, mi iris la flughavenon de tiu urbego, sed neniu renkontis min! Mi staris sola kun miaj posedaĵoj, sed sen la ĉina lingvo.

### Prelegi antaŭ cent studentoj

Malfeliĉe, Liu devis forrestadi dum kurso, kaj liaj kolegoj ne sciis, ke la flughaveno havas du elirejojn: unu por enlandanoj kaj dua por eksterlandanoj. Ili pacience atendis min ĉe la unua, dum mi, tute ne kapabla komuniki kun iu, pacience atendis ilin ĉe la dua. Kvankam mi ne povas bone desegni, estis per krajonaj bildoj, ke mi komprenigis al diversaj ĉinoj pri mia celo, kaj fine alvenis en la dormejon. La morgaŭon Liu alvenis, kaj ĉio estis en ordo, ĉar

ni povis klare konversacii en Esperanto, kaj la cetero de mia semajno en lia urbego tre plaĉis al mi. Mi eĉ prelegis dum horo al cent universitataj studentoj en la tiel nomata 'Sunday English Corner', pri la avantaĝoj de Esperanto kompare kun la angla.

### Tradukiĝis britaj lerniloj

Estis ege interese rimarki, ke la lernolibroj uzataj de komencantoj en la urba Esperanto-asocio estis ĉinaj versioj de *Secondary Esperanto Book 1* kaj *Secondary Esperanto Book 2*, de nia brita samideano Raif Markarian. Mi mem ekstudis Esperanton per korespondkurso bazita sur tiuj libroj, gvidate de Albert Lindsay, en 1974. Fascinis min vidi en Guilin, ke ĉiuj anglaj instrukcioj kaj konsiloj en tiuj libroj estas tradukitaj en la ĉinan. Aldone, mi vespermanĝis en la hejmo de Liu, lia edzino kaj juna filo, konsciante, ke tio estas granda honoro, ĉar en Ĉinio oni rare gastas en privata hejmo.

Ĝuinte mian restadon en Guilin, mi alvenis en Esperantion, en la formo de la Unua Azia Esperanto-Kongreso, en Hotelo Silka Vojo, Ŝanhajo. Kompreneble, ĉiuj krom la hotelpersonaro parolis Esperanton, kaj estis ĝojo sperti amikecon kun homoj de dek ses aziaj landoj. Sed mi malkovris, ke mi estas la nura kongresano de nia lando, kaj

*Daŭrigo sur paĝo 18*

## January Book Sale!

Some of these titles are really worth having, just a little bit old. We have to make room for modern stock, so do take advantage of these special offers, many at half price, some at even greater reductions on the original selling price. Please add 15% for p.&p. If you order 3 or more books of one title to the same address, postage is free on books in this list. **(The number of books of each title appears in brackets.)** The EAB-office address is on page 2.

### FICTION

*Amo kaj morto en Balio* V. Baum. Was £6.30 **now** £3.50 (5)  
Rotterdam: UEA, 1986, 420p. Translation from German. Novel about traditional life on Bali.

*Angla Antologio 2* Ed. W. Auld. Was £4.20 **now** £3.20 (6)  
Rotterdam: UEA, 1986. 420p. 22cm. Translation. Poetry and prose of more than 50 English writers from 1800 to 1960.

*Aŭstralia antologio* Ed. Alan Towsey. Was £14.70 **now** £8.00 (1)  
Pisa, 1988, 431p. 21cm. Varied and impressive collection of translations.

*Bestoj kaj homoj* Bernard Golden. Was £7.00 **now** £4.00 (2)  
Pisa, 1987. 135p. 21cm. 13 original stories, many of them prizewinners in literary competitions.

*Cent jaroj da soleco* Gabriel García Márquez. Was £14.70 **now** £9.00 (2)  
Chapécó: Fonto, 1992, 372p. 20cm. Translated novel by prize-winning Columbian writer.

*Ĉina antologio 1949–1979*. Was £5.60 **now** £3.20 (2)  
Peking, 1989. 418p. 21cm. Translated works by the most representative writers of the period.

*Erevono* S. Butler. Was £2.50 **now** £1.30 (many)  
London, 1978. 183p. 22cm Translated by A. Venture. The utopian satirical novel *Erehwon*.

*Forkaptita* R.L. Stevenson. Was £2.80 **now** £2.30 (many)  
Glasgow, 1989, 181p. 21cm. An excellent translation of Stephenson's adventure story *Kidnapped*.

*Frosta nokto* Bakin. Was £3.50 **now** £2.00 (1)  
Peking, 1990. 302p. 22cm. A family tragedy in war-stricken China.

*Insulo de revoj* Manjo Austin. Was £7.68 **now** £3.70 (2)  
Pisa: LF-Koop, 1989. 95p. 21cm. Entertaining love story of a British woman in Italy.

*Knabino kiu ne volis iri al la infanejo*, La M. Markheden. Was £4.03 **now** £3.30 (3) 1988. 33p. 24cm. hb. Charming children's story, colour illus.

*Kiuj semas plorante...* É. Tófalvi / O. Kníchal. Was £3.30 **now** £2.00 (4)  
Rotterdam: UEA, 1984, 107p. 21cm. Original novel and winner of the Raymond Schwartz Prize.

*Laŭta vekhorloĝo* Stefan MacGill. Was £4.80 **now** £2.60 (5)  
Budapest, 1988. 200p. 20cm. Amusing exercises to encourage conversation.

*Malgranda Johano*, La F. van Eeden. Was £4.00 **now** £2.00 (6)  
Fonto, 1986. 142p. 21cm. Trans. story about a child's maturing.

*Maria kaj la grupo* Emba. Was £5.18 **now** £3.40 (2)  
Vienna, rpt 1990. 180p. 21cm. Original, psychological novel (1932) on the internal life of a contemporary working-class Esperanto society.

*Memori kaj forgesi: Noveloj el la Norda Montaro* Trevor Steele. Was £6.14 **now** £4.80 (3) Vienna, 1992. 143p. 21cm. Original Australian stories based on the author's childhood experiences during the 1950s and '60s. Two stories concern problems of social contact between whites and aborigines, and those of mixed race.

*Remember and Forget* Trevor Steele. Was £4.42 **now** £2.80 (9)  
Vienna, 1995. 123p. 23cm. Translated from the original Esperanto by the author, plus two further short stories.

*Morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko*, La Jorge Amado. Was £2.40 **now** £1.60 (4) Chapécó: Fonto, 1984. 109p. 21cm. Trans. G. Padua. Amusing social novel from a famous Brazilian author.

## ▪ Ideas for groups or friends

How about a bit of reading and joint study during the winter? It can lead to discussion on style, content, likes and dislikes, maybe to translation as a group or individually then further discussion ...

It's difficult when you have beginners and experts in the same group, so how about a book that comes in English as well as Esperanto? Beginners can cheat a bit if they get stuck.


Trevor Steele's collection of stories from his youth in Queensland, for instance – *Memori kaj Forgesi* – comes in the original Esperanto as well as in the author's later translation into English as *Remember and Forget*. Both are at prices greatly reduced from the original in our January Sale, and well worth the read.

Or there's a new book – *Friend from Kananam* – in both English and Esperanto.

### Unbeatable value!

Some titles are being reduced in the January Sale, simply because the date of publishing is more than 10 years ago. The quantity appears in brackets, so if you'd like to make a group purchase, we'll send 3 or more copies of the same book to one address post free – unbeatable value.

How about *La Laŭta Vekhorloĝo* – not too taxing, designed to stimulate conversation. Or *Internacia Kuirlibro* – here's a challenge: try out a recipe and



The classic novel *La Vila Mano* by H.J. Bulthuis, and (right) the later, English version of Trevor Steele's novel *Memori kaj Forgesi*



bring it to your meeting. Discuss whether you got it right!

There are volumes of poetry, not everyone's first choice, but we can all learn from the flexible and sometimes unusual use of our language. There's *Merlo sur Menhiro* or *Enlumiĝo* by Albert Goodheir. We have *Unufingraj Melodioj*, by William Auld, rather tatty cover, but timeless inside.

In our newest booklist you'll find a few books of short sketches – quite a good way of engaging the timid speaker. *Facila Skeĉalbumo* by Bertram Potts or *Fonetika Interpunkcio kaj Aliaj Skeĉoj* by Stefan McGill, or his *Pordoj* – 11 short sketches specially graded for beginners' groups.

And for those who like Shakespeare – try one or more from our selection in the booklist: [www.esperanto-gb.org](http://www.esperanto-gb.org) or [www.esperantoeducation.com](http://www.esperantoeducation.com).

Or how about some amusing shaggy-dog stories by Bill Simcock: *Humuraĵoj* (£1.15 incl. p.&.p)? And from another British author, Bruno Najbaro, we have *Rakonto de Kampara Bubo*.

Something a bit more challenging, *Lingvaj Respondoj* de L.L. Zamenhof, republished in 1995, has just arrived in stock. Zamenhof often received letters asking his opinion and advice on various linguistic aspects of Esperanto. This is a collection of his replies, originally published from 1906 to 1910 in *La Revuo*.

*Feliĉan legadon!*

JMB



*Nigra Spartako*, La Geraldo Mattos. Was £2.69 **now** £1.80 (4)  
Chapecó: Fonto, 1986. 56p. 21cm. Story about the colonisation of a region of Africa.

*Sfinkso de Steplando*, La V.A. Glazunov. Was £4.22 **now** £2.50 (4)  
Chapecó: Fonto, 1988. 110p. 21cm. Lively original stories inspired by travels of a Russian geographer.

*Spartako* J. Leslie Mitchel. Was £5.50 **now** £4.00 (2)  
Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 218p. 21cm. Trans. W. Auld. Slave revolt against the Romans led by Spartacus.

*Vila mano*, La H.J. Bulthuis. Was £11.71 **now** £7.50 (2)  
Vienna, 1991 (2nd ed.). 300+14p. 20cm. Amusing original novel, first published in 1928.

*Vualo de l' tempo*, La J.H. Sullivan. Was £2.50 **now** £1.90 (1)  
Antwerp, 1985. 116p. 22cm. 12 original stories by this well-known author.

#### NON-FICTION

*Centa simio*, La K.Keys, Jr. Was £1.40 **now** £1.10 (4)  
The Hague, 1984. 135p. 20cm. Tr. J. Naber-Keller. Opinion about nuclear disarmament.

*Ĉinaj familiaj pladoj* Liu Cajseng. Was £1.86 **now** £1.00 (3)  
Peking, 1986. 69p. 18cm. Recipes of Chinese specialities.

*Ĉiu Ĉiun; sep jardekojn en la Esperanto-movado* Teo Jung. Was £9.70 **now** £4.90 (1)  
La Laguna/Antwerp, 1979. 400p. 21cm. Events from the life of the founder of *Heroldo de Esperanto*.

*Dek prelegoj* K. Kalocsay. Was £3.84 **now** £2.50 (1)  
Budapest, 1984. 126p. 20cm. The Esperanto movement, language and literature.

*Eseoj I – Beletro* G. Waringhien. Was £8.60 **now** £4.50 (4)  
1956, 234p. Learned and entertaining essays on literature.

*Gambo rafiki* Tibor Sekelj. Was £7.62 **now** £3.60 (2)  
1991. 172p. Description of an expedition through Africa.

*Internacia kuirlibro* J. Shorter-Eyck. Was £1.20 **now** £0.90 (many)  
London, 1971. 193p. 21cm. Coll. of recipes from around the world.

*Kuriozaj floroj kaj arboj* Qitai et al. Was £8.00 **now** £4.00 (2)  
Beijing, 1988. 146p. 26cm. Luxurious album of plants from Yunnan.

*Li kaj ni* Ed. R. Haupenthal. Was £12.28 **now** £7.00 (2)  
Antwerp/La Laguna, 1985. 520p. 22cm. 49 eminent Esperantists contributed to this volume of articles on literature, interlinguistics, etc.

*Pekinaj vidindaĵoj* Trad. Mollum. Was £5.00 **now** £3.10 (2)  
Peking, 1989. 144p. 24cm. Many colour photos with map and brief descriptions.

*Preter la horizonto* Gibran Khalil Gibran. Was £4.50 **now** £3.00 (4)  
1992. 96p. Thoughts from the famous author of *La Profeto*.

*Sub cirkotendo* Stan Bubenić. Was £4.80 **now** £3.30 (1)  
The Hague, 1988. 195p. 21cm. Autobiographical novel about circus life.

#### POETRY

*Du el* M. Bouton/P. Thorsen. Was £3.20 **now** £2.90 (3)  
1985, 250p. 22cm. A volume of varied poetry from two well-known authors.

*Elpafu la sagon* Comp. by Tibor Sekelj. Was £5.76 **now** £3.20 (3)  
Rotterdam, 1983, 187p. 21cm. illustrated. Anthology of unwritten folk poetry, mainly from cultures not previously represented in Esperanto.

*Enlumiĝo* A. Goodheir. Was £2.00 **now** £1.00 (7)  
Glasgow, 1987, 44p. 21cm. Thought-provoking original poems.

*Merlo sur menhiro* A. Goodheir. Was £2.80 **now** £2.00 (6)  
Glasgow, 1979, (2nd Edition). 94p. 21cm. Lyrical and thought-provoking poetry.

*Prometeo ligita* Aeschylus. Was £3.30 **now** £2.80 (many)  
Glasgow, 1982, Trans. by A. Goodheir. 54p. 21cm. From the Greek verse tragedy.

**Geoffrey Hammerton**

Dear Geoffrey,

I read in the last issue of *EAB Update* (No.31, p.15) of the death of Geoffrey Hammerton. During the time that I was Hon. Secretary of EAB about five years ago, Geoffrey was a very dedicated member of my small team who helped to phone members who had not renewed their membership. I am sure that in many other unsung ways people like Geoffrey worked behind the scenes and, unnoticed, helped to keep the life of EAB flowing.

Eric Walker

**Esperanta 'PledgeBank'**

Kara redaktoro,

'PledgeBank' estas retejo por instigi homojn al agoj, ĉefe al tiuj, kiuj bezonas plurajn personojn. Ni kredas, ke la mondo bezonas tian servon: multaj bonaj aferoj ne okazas, ĉar ne estas sufiĉe da organizitaj personoj por ilin fari.

Jen ekzemploj: 'Mi promesas recikligi miajn rubaĵojn, se cent samurbaĵoj faros same'. 'Mi promesas sendi skatolon da libroj al afrika Esperanto-centro, se dek kvin aliaj personoj sendas al mi pliajn librojn por replenigi ĝin'. 'Mi promesas konstrui utilan

retejon, se mil personoj promesas kontribui al ĝi'.

Mi invitas vin viziti la novan Esperantan vizaĝon de 'PledgeBank' ĉe <[www.eo.pledgebank.com](http://www.eo.pledgebank.com)>, kie oni povas malkovri pli da detaloj per la respondaro <[www.eo.pledgebank.com/faq](http://www.eo.pledgebank.com/faq)>, subteni la agon de iu promesanto aŭ eĉ krei propran promeson ĉe: <[...eo.com/new](http://...eo.com/new)>.

La unua promeso en Esperanto estas ĉe: <[...eo.com/subtitoligi](http://...eo.com/subtitoligi)>. Ne hezitu subskribi ĝin, aŭ simple aldonu komenton per la formularo sube dekstre sur la paĝo de la promeso, se vi preferas.

Mi antaŭdankas al vi pro via eventuala helpo tiurilate, kaj evidente disponeblas por ĉiu kroma informo bezonata.

Samideano, Tim Morley

**SATEB invitas ...**

Estimata redaktoro,

Permesu al mi profiti vian gazeton por disdoni al la legantaro ĝeneralan inviton al la ĉiujara semajnfina kunveno de SATEB ĉe Barlaston, 12–14 majo 2006.

La plimulto ja scias, ke SATEB (t.e. SAT en Britio) estas kuniĝo de membroj kaj sampensantoj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) en Britio (kaj aliaj anglalingvaj landoj). SAT mem estas la ne-neŭtrala flanko

de la tutmonda esperantanaro: malkiel UEA, ĝi ne hezitas esplori kaj esprimi opiniojn pri gravaj hodiaŭaj temoj, ĉu politikaj, ĉu sociaj, ekonomiaj, eĉ etikaj. La semajnfino do estas unika okazo por esperantoj en Britio uzi nian lingvon por diskuti temojn, kiuj sendube interesas nin. La gastpreleganto ĉi-jare estos Ed Borsboom, konata nederlanda aŭtoro de biografioj de Lanti kaj de Andreo Cseh.

Plena informo havebla aŭ de la Kolegio aŭ de mi: [davidekelso@yahoo.co.uk](mailto:davidekelso@yahoo.co.uk). Mi dankas.

David Kelso,  
Prezidanto de SATEB

**Nova adreso de feriejo Mielno**

Estimata samideano,

Mi sciigas, ke Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, havas novan retejan adreson, kie troviĝas multaj interesaj paĝoj kaj du galerioj de fotoj: [www.esperanto.koszalin.pl](http://www.esperanto.koszalin.pl).

Vi trovos interalie informojn pri la 28-a Ĉebalta Esperantista Printempo, okazonta venontjare en Mielno. La informilon sekvas aliĝilo, kiun oni povas resendi rete. Estu tiel afabla kaj sciigu viajn esperantistajn geamikojn.

Czesław Baranowski,  
Prezidanto de Kofialina Filio de PEA

**Lokoj en Londono serĉataj**

Saluton, Samideanoj!

Mi estas esperantisto de Usono, sed mi nun loĝas en Honduro kiel volontulo kontraŭ ajdoso. Mi aktivas en la usona junulara Esperanto-movado (USEJ) – mi havas 23 jarojn. Venontjare mi translokiĝos al Londono por studi lingvistikon en la Universitato de Londono. Tamen, mi ne havas lokon kie loĝi nek labori en Londono. Mi do petas al vi, samideanoj en Londono, se vi konas laborojn aŭ loĝlokojn en via urbo por samideano. Multajn dankojn por via helpo.

James 'Jaĉjo' Russell  
[finavenko@gmail.com](mailto:finavenko@gmail.com)

**Daŭrigo de sur paĝo 15**

kiam oni malfermis la kongreson, oni petis min reprezenti Brition antaŭ aŭskultantaro de sescent!

Post tiu ŝoko estis alia, ĉar evidente estas kutime en orientaj landoj babili dum elparoloj. Tiu, kiu elparolis antaŭ ol mi stariĝis estis pakistanano, kiu evidente akceptis tion kiel normalon, sed kiam la babilado ne ĉesis, kiam mi frontis la aŭdantaron, mi kriis laŭte: 'Bonvolu aŭskulti! Mi jam vojaĝis longe por reprezenti Brition. Bonvolu aŭskulti!'

Plaĉis al mi, ke la homoj tuj silentis, do mi daŭrigis: 'Mi alportas bondezirojn de miaj geamikoj en Esperanto-Asocio de Britio, kaj bonvolu kuraĝigi al

vijaj registaroj, ke ili instruigu Esperanton kiel propedeŭtikan lingvon!'

La kongreso estis neforges-ebla. Mi amikiĝis kun multaj homoj. Koincide, unu el la plej elstaraj geamikoj dume ekkonataj estis 'Ranga', alie nomata P.V. Ranganajakulu, Helpa Profesoro en Tirupati, Andrapradeŝo, Hindio – ĝuste kie la Kvina Azia Esperanto-Kongreso okazos en 2008, kiel anoncote en la pasinta numero de ĉi tiu bulteno, danke al kio mi rememoris elstaran eventon de mia vivo: kiam mi reprezentis Brition!

David Curtis,  
Weston-super-Mare

## *'Ho, tre plaĉas al mi apud la maro'*

Tiel iras la fama kanto, kaj la Loka Kongresa Komitato de la 87-a Brita Kongreso, okazonta en Scarborough de la **28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2006**, laboras por doni al la partoprenantoj tiun plaĉan senton.

La kunveno okazos en Hotelo Green Gables, kies specialaĵo estas konferencoj por junuloj kaj studentoj – kaj ĝi disponas pri naĝejo; ĉu la unuan fojon en nia kongresa historio? Do, aliĝu senprokraste, kaj memoru kunporti la naĝ-ekipajon!

Scarborough troviĝas je malpli ol unu-hora veturdistanco de la urboj York, Bridlington kaj Whitby. Scarborough mem ofertas la kutimajn marbordajn amuziĝojn, vizitindan kastelon kaj teatron.

Aldone al la varmigata endoma naĝejo, la hotelo ofertas laŭmenuan restoracion por ĉiaj dietoj, baron de alkoholaĵoj, eksteran ŝakejon, ludejon por du specoj de bilardo, tabloteniso kaj surtabla futbalo, kaj privatan parkejon senpagan.

La adreso de la hotelo estas: Green Gables Hotel, West Bank, Scarborough, North Yorkshire YO12 4DX. Tel. 01723 361005; info@greengablesscarborough.co.uk. Pliaj informoj haveblas de la ttpaĝaro: www.greengablesscarborough.co.uk, sed pri ĉiuj aferoj, kiuj rekte rilatas al la kongreso, bonvolu nepre kontakti unue la oficejon de EAB. Aliĝilo troviĝas kun ĉi tiu numero.

*Konferencjo en la hotelo*



Supre: *Panoramo super la marborda urbo Scarborough.*  
Sube: *La nova hotela baro*



Supre: *La ekstera aspekto de Hotelo Green Gables.* Sube: *Konferencjo en la hotelo, kie okazos la venonta brita kongreso*



### **165 enskribiĝis ĉe Esperanto-budo en Universitato de Oksfordo**

Same kiel en la pasinta jaro, mi ĉi-jare organizis Esperanto-budon dum la foiro de novaj studentoj en la Oksforda Universitato. Sed ĉi-jare ĝi estis multe pli sukcesa: entute 156 homoj enskribiĝis kiel interesitoj, kompare al nur 54 pasintjare.

Tiu ŝanĝo ĉefe ŝuldiĝis al la granda helpo de Heleno Fantom, kiu provizis per grava homforto kaj varbomaterialo, sed ankaŭ al mia propra pligrandiĝinta sperto pri varbado. Alia helpanto ĉe la budo estis Sebastian Linfoot el la Oksforda Esperanto-klubo, kaj pri materialo ankaŭ multe helpis Marjorie Boulton.

Mi konstruis montro-banderolon por meti supren kaj tiel altiri la atenton de la preterpasantoj. Sur la malgranda tablo ni havis gazetojn, kompakt-diskojn de muziko, informilon pri Pasporta Servo kaj kelkajn aliajn utilajn aferojn. Precipe la muzik-KDoj vekis pozitivan surprizon ĉe pluraj interesitoj. Malbonŝance paketo kun faldfolioj disdonendaj ne alvenis ĝustatempe ĉe Heleno. Tial ni disdonis nur folietojn kun utilaj ret-adresoj pri kaj en Esperanto.

Heleno varbis pri Esperanto ankaŭ ĉe la organizantoj de la aliaj budoj, tiel ke nun multaj socie aktivaj studentoj almenaŭ scias, kio estas Esperanto.

Nun la interesitoj kiuj enskribiĝis ricevos retmesaĝon de mi kun detaloj pri Esperanto-kurso por komencantoj, kiun mi organizos. Mi esperas, ke multaj venos, kaj ke almenaŭ kelkaj serioze lernos.

Marcos Cramer

## Could you take on EAB NetNews?

*EAB NetNews* was an important source of information about Esperanto via the internet. Unfortunately, this 'news agency' has not been operating for some time due to the lack of someone who can take it on. Would you be interested?

Essentially, it should inform pertinent media contacts, politicians, etc. of key news and events just a few times a year – as and when the occasion arises – so the task is not onerous.

The chief task is to select and compile brief news items in a format that might attain immediate publication. One should not expect to be published often. Such a service shows the media Esperanto is alive and well, which may prompt publication of other material or the interest of an individual journalist looking for a story. Part of the job is also to maintain the list of relevant addresses. Help and advice will be on hand.

If you are interested, please contact the EAB office (details on page 2). Tel. 0845 230 1887.

### • Open Evening in Edinburgh

The Edinburgh Esperanto Club celebrated its centenary with an open evening on 4 October. Wine, nibbles, short presentations, a video show and a display of literature attracted around 20 people. Display stands from the EAB office in Barlaston enhanced the occasion. A follow-up mail-shot was sent out.

### • Dufoja germana disaŭdigo

La 22-an de oktobro (19h10 ĝis 19h40 BST) kaj denove la postan tagon ekde 07h10 la eksterlanda servo de la germana ŝtata radio, Deutsche Welle, dissendis interesan programon pri la historio de Esperanto kun multaj aliaj informoj. Se vi komprenas la germanan, eventuale ankoraŭ aŭdeblas ĉe Deutsche Welle: <http://www.dw-world.de/dw/0,,4678,00.html>, sub la rubriko 'Land und Leute: Unterwegs in Deutschland und bei unseren Nachbarn'.

### • Norwich Jubilee Esperanto Foundation

The 2005 Annual Report of the Foundation notes that 16 young people were helped to travel by the Foundation during the financial year, including three

African Esperantists who came to Britain. The Foundation had an excess of income over expenditure of over £5,240.

### • 'Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo'

Jen la iom longa temo de la venonta, 91-a Universala Kongreso de Esperanto (29 julio–5 aŭgusto), kiu okazos en Florenco en 2006. La traktadon de la temo partoprenos la

eminenta lingvopolitika fakulo François Grin (vidu paĝon 11), profesoro pri ekonomiko en Universitato de Ĝenevo, kiu cetere festparolos en la kongresa inaŭguro.

La temreĝisoro, d-ro José Vergara ([jovergaola@surnet.cl](mailto:jovergaola@surnet.cl)), volonte akceptas proponojn pri aliaj kontribuoj kaj ideojn pri la temtraktado. Por komenca orientiĝo UEA rekomendas la informilon *Raporto pri Homara Evoluo* de la Evolupprogramo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu estas trovebla en pluraj lingvoj ĉe: <http://hdr.undp.org/reports/global/2004>. Oni jam komencis esperantigi la raporton. Parto de la traduko jam legeblas ĉe: [www.tejo.org/uea/traduko\\_el\\_HDR\\_2004](http://www.tejo.org/uea/traduko_el_HDR_2004).

Gazetara komunikado de UEA

### • Esperanto on the Paul O'Grady Show

The television Paul O'Grady Show featured five minutes of chat about Esperanto with Tim Morley on 26 October. Tim reports that he enjoyed the experience, and immediately afterwards congratulatory text messages and e-mails arrived. Paul O'Grady's attitude was very positive – in his presentation he spoke as if he knew something about it ('The international language Esperanto, it's getting

## Public speaking - excellent promotion

On 29 October I had the pleasure of addressing Southport Lecture Society about Esperanto. My talk was previewed in the *Southport Visitor*, headlined 'Spotlight on Esperanto'. Using my prepared notes, I spoke for 40 minutes with the aid of an overhead projector and a number of visual aids.

The highlight of my talk was a live Esperanto conversation between my good friend Vivienne Isherwood and myself, with a bilingual script distributed beforehand to those present. About 12 people attended the event, and they were an attentive audience and asked several questions. Some of them took copies of Lesson 1 (from our introductory course) and they engaged me in conversation informally afterwards.

If you would like to undertake public speaking about Esperanto, I can send you some useful notes about such presentations, and if you would like any ideas for content of a talk, I would willingly send you a copy of my storyboard as well. This is an excellent way to spread the word about Esperanto in your local community.

Jim Voiels (tel. 01704 226776)

# Kelkaj surprizoj ĉe Pariza kunveno pri plurlingvismo

La 24-an kaj 25-an de Novembro okazis en Parizo ‘Assises européennes du Plurlingvismo’. Inter la ĉirkaŭ 200 partoprenintoj ĉe-estis pluraj esperantistoj. Claude Nourmont aliĝis nome de UEA, aliaj nome de E-D-E (Eŭropo-Demokratio-Esperanto), partio kiu prezentiĝis ĉe la eŭropaj balotoj en Francio.

Pluraj esperantistoj proponis antaŭe prelegon, kie ili klare menciis Esperanton en sia kontribuo. Ĉiuj rifuzitaj.

Sed tiuj du tagoj alportis kelkajn surprizojn ...

En la enkondukita prezento okazis la kutimaj forviŝoj de artefaritaj lingvoj, ‘sensukcesaj’, ‘senkulturaj’ ks, sed ne estis tre grave, ĉar la prelego estis iom konfuza.

## ‘Ekzistas lingvo facila, ..., kiu funkcias jam de jardekoj’

Inter la podianoj de la tuj posta sesio sidis Robert Phillipson kaj Charles Durand. La surprizo venis de Charles Durand. La invitintoj certe atendis (la kontribuo en alia sesio estis pri ‘La recherche scientifique paye une taxe à la langue unique’ (Scienco pagas imposton pro la unulingveco – pri kio li pli-malpli intervenis en Nitobe-simpozio) de direktoro de Franca Instituto pri Informatiko en Hanojo, ke li glorigos frankofonion. Sed Charles Durand tuj anoncis, ke li parolos en sia propra nomo, tute

ne nome de sia instituto. Kaj kio estis la konkluda parto de lia prelego? Ke fronte al tiuj lingvaj problemoj ekzistas lingvo facila, kun simpla gramatiko, kiu funkcias jam de jardekoj ... Mi precizigu la ĉefan aferon: li parolis dum pluraj minutoj pri tiu lingvo, sen nomi ĝin. Li sciis, ke ĝi estas tabua vorto (kiel cetere diras prof. Helmar Frank, kiam li preferas uzi ILo).

La posta preleganto kompreneble tuj prononcis la tabuan vorton, kun kelkaj malestimaj komentoj, sed ...

## Atelieroj

Mi ĉeestis la atelieron, kie estis prelegontaj Seán Ó Riain, R. Phillipson, K. Gawlitta, do subtenantoj de Esperanto.

Ankaŭ ĉeestis la esperantistoj de E-D-E (4 aŭ 5); konsiderante, ke estis apenaŭ kvardeko da homoj en la salono, estis forta proporcio da esperantistoj kaj simpatiantoj.

Post prelego de Seán, la kunvenestrino komentis: ni ne volis pri Esperanto kiam ni preparis la kunvenojn, sed en tia formo kiam vi prezentas la aferon, estas tute akceptebla kaj interese (aŭ io tia).

Iuj el E-D-E-anoj intervenis en eble tro pasia maniero (laŭ mia gusto) post la prelego de Seán, sed fine ili pravis.

La reagoj ne estis malpli pasiaj flanke de la neesperantistoj.

Verŝajne estis la plej vigla debato de la tuta kunsidaro. Fine estis komento de iuj: ni havas nenion kontraŭ Esperanto, sed kiu rilato kun plurlingvismo? Mankis bedaŭrinde la tempo por pludebati kaj klarigi tion. Cetere postaj prelegantoj ankaŭ aludis pri Esperanto.

## Fina sesio en la pleno

Ĉe la fina dokumento kaj konkludoj, la raportantino ja menciis la vigan pasian debaton pri Esperanto. Ankaŭ la plendojn, ke interne de iuj eŭropaj institucioj, oni ne respektas la egalecon de lingvoj: dunganoncoj estas por ‘English native speakers’. Sed plej grave, estis akceptita la propono, el la prelego de Seán Ó Riain, fari eksperimentojn pri la prope- deŭtika valoro de Esperanto.

Sed ne finiĝis la afero ... la lasta surprizo.

## Solidareco de esperantistoj

Parolis la delegito de CFTC, Jean-Loup Cuisiniez. Vigle, tre aŭskultite, plej aŭskultite, ĉar li ne parolis en akademia pompa stilo, sed en vera, vereca, vigla stilo, pri la subfosa konkerado fare de la angla lingvo en Francio. Li parolis ankaŭ pri tiu proceso de la dungitoj de entrepreno GEMS, kontraŭ la entrepreno kies instrukcioj estas en la angla. Ili gajnis, sed la entrepreno apelaciis, kaj estos denove proceso. Kaj, jen la ĉerizo sur la kuko, li menciis, ke la sindikatoj subtenis la dungitojn, kaj ke ili estis helpitaj de la Esperantomovado en la manifestacioj.

Do entute iom da progreso.

Claude Nourmont

very popular, you know. ...’) and he seriously accepted what Tim had to say. If you have broadband you can see the programme on <<http://homepage.mac.com/timsk/iMovieTheater3.html>>.

• **Al la naskiĝloko de Pinokjo**  
En kiu lando naskiĝis Pinokjo, la

infano el ligno sed kun koro de infano, kiu ĝojigas ĉiuaĝajn infanojn tra la mondo? En Italio, kompreneble, kaj ĝuste apud la loko de la ĉi-jara Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos en Prato, 20 kilometrojn de Florenco. La kongreseto okazos en aparta gastejo por skoltoj, vagantoj ks, en parko, kaj oni

antaŭvidas ekskursojn al la apuda Collodi, la naskiĝ-vilaĝo de la aŭtoro de Pinokjo, kie troviĝas porinfana amuzejo.

## • Esperanto Garden

Thanks to the generosity of an anonymous Scottish Esperantist, the Esperanto Garden now has its first piece of poetry in place – an

excerpt from 'Rekviemo' by Albert Goodheir (1912–95). An associated decorative feature is about to be added, again thanks to a Scottish Esperantist.

The raffle at the 100th Scottish Esperanto Congress raised enough money to do a lot of bulb planting, including some of the small red Esperanto tulip.

Grateful thanks to Diana Robin, who worked heroically during very wet weather to help us complete the task.

• **Serĉas laboron**

Pola esperantistino (parolas ankaŭ la anglan) serĉas postenon kiel 'prizorganto' por maljuna viro, virino aŭ geparo. Bonaj

rekomendoj. Ŝi estas Maria Romanowska – konata al multaj britaj esperantistoj. Se vi konas homojn, kiuj bezonas prizorganton, bonvolu sugesti al ili, ke ili kontaktu kun Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich IP10 0LA. Tel. 01473 717088; rete: ericwalker@gn.apc.org.

## Some Esperanto magazines - easy to subscribe for 2006

**Femina** Nova gazeto por virinoj, eldonota de LF-Koop. £14.00

**Fonto** Monata literatura revuo (neregula) £21.00

**Heroldo de Esperanto** 16 fojojn jare. Primovada gazeto. £22.00

**La Migranto** Kvar numeroj jare de la interesa gazeto de La Esperantistaj Naturamikoj – organizaĵo, kiu similas al 'YHA', kun granda nombro da 'domoj' tra Eŭropo kaj intereso pri ekologio. £10.00

**Monato** Unu el la plej bone konataj gazetoj en Esperantio. Dek du numeroj jare. £32.00 (ankaŭ nun havebla en reta formo – askia aŭ unikoda versio £19.20)

**La Ondo de Esperanto** Monata soci-kultura revuo el Rusio. £18.00

**La Jaro** Persona agendo kun multegaj informoj, inkluzive naciajn kaj religiajn festojn. £4.00

**Juna Amiko** Four issues per annum. An excellent magazine for school students, beginners of all ages and course leaders. Special rates for group subscriptions are available on request. 'Se vi instruas Esperanton, se vi lernas Esperanton aŭ se vi volas fortigi ĝin, abonu kaj abonigu al la lernejana gazeto.' £10.00

**La Kancerkliniko** 'Kultura, politika, skandalema, ajnista'. Abono ampleksas kvin numerojn. Eblas aboni iam ajn en la jaro. £15.00

**Laŭte** Dumonata gazeto, kiu celas plejeble favori liberan esprimadon de pri ĉiuj temoj, sen tabuo kaj sen cenzuro. Ses numeroj jare plus literatura suplemento. Ĉiu numero ampleksas minimume 36 paĝojn, kun ebleco atingi 72 paĝojn, laŭ la ricevita materialo. £11.00

**Literatura Foiro** Dumonata kultura revuo. £20.00

**Litova Stelo** Belaspekta, interesa. Abonoj ne havas limdaton; oni ricevas ses numerojn. £10.00

**Scienca Revuo** La oficiala periodaĵo de ISAE. Kvarfoje jare, ĉiu numero kun 52 paĝoj. £13.00

• Except where mentioned subscriptions run from January to December. Cheques should be made payable to 'David Kelso' (no receipts will be sent unless specifically requested): 5 Craighill Road, Kilncadzow, Carluke ML8 4QT; e-mail: davidkelso@yahoo.co.uk.



• **Dana artlernejo publike komikas Esperante**

Venis sciigo pri publika prezento de 'la unua Esperanta sitkomo [tiele!] en la mondo' sub la titolo 'Espero'. Kiel ajn estas la vero pri tio, klare temas pri interesa incitatio de Instituto de Nuntempa Arto Overgaden en Kopenhago (Overgaden Neden Vandet 17, Christianshavn, DK-1414 København K). Okazis tri prezentoj la 3-an de novembro. La kvin geaktoroj konstruis propran scenejon. La 'unuan epizodon' ili provludis kaj surbendigis en la scenejo, lerminte Esperanton precipe por ĉi tiu okazo. Eventuale helpis, ke la eniro estis senpaga kaj troviĝis baro vendanta refreŝigaĵojn. La teksto estis de Lars Husum, kaj subvenciis Dana Administrato por Vida Arto kaj produktita ĉe Nacia Laborejo por Artoj kaj Slojdo (www.laloko.org).

• **Partoprenu en la 6-a Internacia Himalaja Renkontiĝo**

La renkontiĝo okazos en Nepalo inter la 26-a de februaro kaj la 10-a de marto 2006, organizata de Nepala Esperanto-Asocio. La baza kotizo estas 700 usonaj

### Trafaj esprimoj?

Se vi rimarkas aparte trafajn aŭ speciale sukoplenajn esprimojn, kial ne sendi ilin al ni por publikigo. Ne gravas, se ili ne estas novaj – bonaj aferoj estas kunhavindaj. Kaj ni volonte publikigas demandojn kiel 'Kiel oni plej bone esprimu tion kaj jenon?' Do, jen kelkaj:

jetdebeto, horzonozo *jet lag*  
poŝtelefono *mobile phone*  
retroprojekciilo *overhead projector*  
tekokomputilo *laptop computer*

## Membership

### New Members

Phil Allen, Birmingham  
Charles Coulston, Coventry  
Peter Crane, Lancashire  
Vicky Fisher, Scarborough  
Jennifer Gwatkin-Young, Hove  
Steve Rowley, Ashford

### Completed the Free Postal Course

A.K. Watkins, Stourbridge

### Deceased

Cyril Love, Wolverhampton  
Roland Wilkins, Eastbourne

dolaroj. Por pliaj informoj kontaktu la asocion ĉe: GPO Box 8974, CPC 102, Katmandu, Nepalo. Rete: [esperanto@wlink.com.np](mailto:esperanto@wlink.com.np); ttt-paĝaro: [www.esperantonepal.com](http://www.esperantonepal.com).

#### • [www.monato.net](http://www.monato.net)

La retpaĝaro de *Monato* donas multajn informojn, kiujn vi ne trovos en la periodaĵo mem. Interalie eblas traserĉi la jam aperintajn numerojn.

#### • 'Whatever Happened to Esperanto?'

A 16-inch column appeared in *The Guardian* under this subtitle on Saturday, 26 November, and even mentioned the Springboard project. See: <http://www.guardian.co.uk/comment/story/0,3604,1651121,00.html>.

#### • UEA denove havas pli ol 6 000 individuajn membrojn

La refortiĝo de UEA atingis mejloŝtonon en septembro, kiam la asocio denove nombris pli ol ses mil individuajn membrojn, unuafoje post la jaro 2001. □

## Nekrologo

**Cyril Love** mortis la 21an de septembro je la aĝo de 91. Li estis esperantisto dum pli ol 50 jaroj kaj instruisto de Esperanto-Klubo de Wolverhampton de la 1950aj ĝis la '70aj jaroj. Ni perdis karan samideanon.

John Gobourne  
– unu el liaj lernantoj

# La aŭtuna kunveno de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio

La aŭtuna federacia kunveno lokazis sabaton, la 1-an de oktobro kiel kutime ĉe Hotelo Eaton, Chester.

Aliĝis dudek partoprenantoj el diversaj partoj de la regiono kaj

prezidanto, d-ro Paul Gubbins, anoncis la gastparolanton, aŭtoron Arnold Pitt. Lia temo estis 'Gaia' – la greka terdiino. Arnold verkis librojn inspiritajn de la verkaro de James Lovelock,

Fotis Lenio Marobin



*Kelkaj partoprenantoj, de maldekstre: Eric Smith, Doreen Winterburn, Celia Mackle, Graham Blakey, Ian Mac Dowall kaj, malantaŭ ili, Andrew Wheatley, Elisabeta Cirio, dekstre de kiu, kun brakoj kunfalditaj, Eric Lee. Malantaŭ Elisabeta estas Stephen Hodson, malantaŭ li kontraŭ la muro estas Stephen Thompson, dekstre de kiu estas Mikaelo Zammit.*

gastoj el aliaj regionoj: kiel Londono, Wolverhampton kaj Kimrio. Du gastoj, kiuj deziris partopreni eĉ el Rusio, bedaŭrinde je la lasta momento ne povis.

Partoprenantoj komencis alveni dum la mateno por interkonatiĝi, kaftrinki kaj babili. Eblis aĉeti loteribiletajn por ses belaj premioj, aĉeti novajn kaj brokantajn librojn aŭ aliajn esperantaĵojn.

Kiam ĉiuj alvenis, ni transpasis al la manĝoĉambro por ampleksa bufeda lunĉo, post kio okazis mallonga federacia kunveno. Poste estis la horo por la ĉi-jara parolado 'memore al Antonia Rostron Van Ess'. Nia

kiu uzis la nomon 'Gaia' kredante, ke la tero estas unika vivanta estaĵo. Ĝi estis tre interesa kaj pensiga temo, kiu – kiel oni povas imagi – starigis plurajn postajn demandojn, kiujn Arnold plene kaj bone respondis.

Poste venis la horo por te/kaftrinkado denove, dum oni faris la loterion. Tion farinte, ni nin dividis en du konversaciajn rondojn: unu por spertuloj kun Stephen Thompson, la alia por komencantoj kaj progresantoj kun Paul Gubbins.

Bedaŭrinde tro rapide pasis tre ĝuinda tago denove en Esperantujo.

Ian Mac Dowall,  
Kasisto



Kastelo Peleş

## Trazigzagante la Sudajn Karpatojn aŭ svinge inter Valaĥio kaj Transilvanio 22 majo–1 junio 2006

Spirhaltigaj pejzaĝoj, unikaj pentritaj monah(in)ejoj, sovaĝaj montaroj, varia arkitekturo, neimagebla folkloro, konstante moderniganta infrastrukturo – jen kelkaj opinioj pri Rumanio. Kuniru kaj vidu surloke la Kastelon Peleş, la episkopan preĝejon en Curtea de Argeş. Gustumu la rumanajn prunbrandon kaj vinojn, kaj la altklasan rumanan kuirarton.

La ekskurson kunorganizas la profesia turisma agentejo Eximtur. Klarigoj okazos ekskluzive en, aŭ estos interpretitaj al, Esperanto. Ekiru el Bukareŝto, foriro el Budapeŝto. Limdato por aliĝi: 20 aprilo.

Prezoj:

- Unu persono en dulita ĉambro: €823.
- Unu persono en unulita ĉambro: €1058.

Pagoj sendeblaj al konto de UEA.


*Petu detalan faldfolion de:* s-ro Ionel Oneţ, p/a Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando; rete: <beronet@hotmail.com>



Kastelo Bran

## KRUCVORTENIGMO

## CROSSWORD PUZZLE



### Horizontale

1. Senvostaj vertebruloj el la klaso de amfibioj, similaj al bufoj, sed kun longaj postaj kruroj, senveruka haŭto kaj kun dentoj (5 literoj plurale).
4. Salita aŭ fumaĵita femuro de porko (5).
7. Interjekcio uzata por alvoki de malproksime (3).
9. Cetaco kun barto anstataŭ dentoj kaj sen dorsa naĝilo (6).
10. Adverba formo de objekto de la penso, prezento de estaĵo aŭ afero en la menso; koncepto, kiu estas la bazo, la esenco de arta, filozofia verko (4).
11. Direkta al unu sama punkto; evoluanta al simila formo (8).
15. En la maniero de mallarĝa kaj malprofunda rivereto (4).
16. Nomo de la 21-a grafemo de la Esperanta alfabeto (2).
17. Elemento de trupo, armeo aŭ floto, al kiu oni komisiis apartan mision (8).
20. Ekstera larĝa ŝtuparo el kelkaj ŝtupoj, finiĝanta supre per plataĵo, sur kiu malfermiĝas dompordo (6).
21. Laŭvorte ripeti, skribe aŭ parole, vorton, frazon aŭ tekston, fragmenton de iu verko (4).

### Vertikale

1. Per forto aŭ minaco forpreni ies posedaĵon (4 literoj).
2. La nomo de la numeralo 0 (4).
3. La kunigaj interspacoj inter du kunigitaj ŝtonaj, brikaj, metalaj aŭ lignaj pecoj, kiujn oni plenigas per gluo, mastiko, mortero; la kunigoj mem (6).
4. Piedvesto, kovranta la piedon nur ĝis la maleoloj (radiko, 2).
5. Punkto de la ĉiela sfero, troviĝanta sur la vertikalo de la observanto kaj rekte malsupre sub ĉi ties piedoj (6).
6. Tuto de la bataloj kaj manovroj, farataj de armeoj en difinita regiono aŭ por difinita celo (7).
8. Interjekcio esprimanta tre ĝenerale la vivecon de sento (2).
11. Mamulo, speco de kavio, ofte tenata kiel dorlotbesto aŭ uzata en medicina eksperimentado (6).
12. Malĵes (2).
13. Mamulo el la ordo de insektovoruloj, kies haŭto estas kovrita de pikiloj, kaj kiu defendas sin kuntiriĝante en bulon (7).
14. Fera kurba peco, kun unu aŭ pluraj pintoj, kiu, en ĉarpentaĵoj aŭ masonaĵoj, servas por kunigi aŭ forte fiksi (radiko, 5).
18. La plej intima parto de ies personeco (3).
19. Interjekcio aŭ prefikso esprimanta malestimon kaj abomenon (2).

### Solvoj

1h. Ranoj; 1v. 2. Nulo; Rabi; 3. Juntaj; 4h. Simko; 4v. 5. Nadro; 6. Operaĵo; 7. Uhu; 8. bo; 9. Baleno; 10. Ideo; 11h. Konverĝa; 11v. Kobajo; 12. Ne; 13. Eritnac; 14. Kramp; 15. Roĵo; 16. Ro; 17. Tachmento; 18. Mio; 19. Fi; 20. Perono; 21. Citi.